

Johann Wolfgang von Goethe,
Glückliche Fahrt

Die Nebel zerreißen,
Der Himmel ist helle,
Und Äolus löset
Das ängstliche Band.
Es säuseln die Winde,
Es rührt sich der Schiffer.
Geschwinde! Geschwinde!
Es teilt sich die Welle,
Es naht sich die Ferne;
Schon seh ich das Land!

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Feliça veturo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Rompiĝas nebuloj
Sub hela ĉielo,
La timan ligilon
Malligas Eol'.
Susuras la ventoj,
Ekagas ŝipistoj.
Rapide! Rapide!
Disiĝas la ondoj
Kaj alproksimiĝas
La ŝip' al la land'!

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Feliça navigado

tradukita de Richard Schulz

Nebuloj ŝiriĝas.
Serenas ĉielo.
Timeman rubandon
Malnodas Eol'.²
La ventoj klopodas.
Vigligas ŝipestro.
Rapide! Rapide!
La ondo disiĝas.
La for' proksimiĝas.
Aperas la land'.

...

²Rikardo Ŝulco skribis origine:

Eolo malnodas

Timeman ruband'.

(Sed tio estas gramatike malĝusta. Devus teksti "Timeman rubandon". M. Retzlaff)

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22).*

Arg-268-540 (2004-09-09 09:10:37)

*Traduko de la Germana poemo “Glückliche Fahrt” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-10-13.*

MR.-102-2 / Arg-268-541 (2004-09-09 09:12:59)

*Traduko de la Germana poemo “Glückliche Fahrt” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984.*

Arg-268-542 (2013-02-26 15:11:56)

Tiu ĉi poem-traduko aperis presita en 1984 en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiun eldonis la konata Esperanto-poeto Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), kiam li loĝis en la germana urbo Mindeno (Mindern). La trian kaj kvaran liniojn de la poemtraduko mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-09 plibonigi; ĉar Rikardo Ŝulco erare neglektis, ke post la vorto “malnodas” oni devus uzi la akuzativan formon “rubandon”. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.